Laŭ miaj konvinkoj mi ne povas ligi min kun la celado kaj idealoj de speciala gento aŭ religio. Mi estas profunde konvinkita, ke ĉiu nacionalismo prezentas por la homaro nur plej grandan malfeliĉon, kaj ke la celado de ĉiuj homoj devus esti krei harmonian homaron. Estas vero, ke la nacionalismo de gentoj premataj – kiel nature sindefenda reago – estas multe pli pardoninda ol la nacionalismo de gentoj premantaj, sed se la nacionalismo de fortuloj estas nenobla, la nacionalismo de malfortuloj estas neprudenta: ambaŭ naskas kaj subtenas unu la alian, kaj prezentas eraran rondon de malfeliĉuloj, el kiuj la homaro neniam eliros, se ĉiu el ni ne oferos sian grupan memamon kaj ne penos stariĝi sur grundo tute neŭtrala. (Privat 1920:185-186).

Finfine, Zamenhof estis fidela al la principoj de la juda klerismo lernitaj jam en lia junaĝo: hebreo endome, homo ekstere. La ‘grundo tute neŭtrala’ menciita en la letero estas kompreneble la lingva teritorio de Esperanto. Ne surprizas, do, ke la sinteno al Esperanto fare de judoj neniel facilas (Halperin 2012). Mi opinias, ke esprimo de Esther Schor estas tre trafa por resumi la rilaton inter judeco kaj Esperanto:

The history of Esperanto is a series of Chinese boxes with a Jewish ghost inside (Schor 2009).

Esperanto is the first successful experiment in the history of humankind to form a new human group based on language instead of ethnicity (in Latin: *ius sanguinis*) or land (*ius soli*). For this reason Zamenhof wanted to build a religious bridge too, in order to sustain this group. This religion was at first called Hillelism and then Homaranism. It did not have too much success.

There was a precise moment when he distanced himself from the destiny of the Jewish people: in 1914, only one month before the beginning of the First World War. At that time, he was invited to take part in the founding of the Hebrew Esperantist League. Zamenhof thanked the Jewish Esperantists for the invitation, and he suggested that Esperanto and Yiddish could be used as working languages within the League (Maimon 1959). It is clear that he did take into consideration the role of Modern Hebrew: in 1914, there was already a speech community, mainly around Tel Aviv, with schools and the first generation of native speakers. It is interesting to read the following letter of Zamenhof, without cuts, in order to appreciate his thinking.

Following my convictions I cannot link myself with the aims and the ideals of a special people or religion. I am profoundly convinced that every nationalism offers humanity only the greatest unhappiness, and that the goal of all human beings should be the creation of a harmonious humanity. It is true that the nationalism of oppressed peoples – as a natural self-defensive reaction – is much more excusable than the nationalism of peoples who oppress; but, if the nationalism of the strong is ignoble, the nationalism of the weak is imprudent: both give birth and sustain the other, and present a wrong circle of unhappy people, from which humanity will never escape, until all of us offer our group self-esteem and start to stay on a completely neutral ground. (Privat 1920:185-186).

At last, Zamenhof remained loyal to the principles of Jewish Enlightenment, that he already learned in his youth: to be a Jew at home, but a person outside. The ‘completely neutral ground’ mentioned in the letter is obviously the language territory of Esperanto. It is no surprise, then, that the feelings expressed towards Esperanto by Jews tend to be mixed (Halperin 2012). I find the following quotation by Esther Schor really to the point in order to resume the relationship between Jewishness and Esperanto:

La historio de Esperanto estas serio de ĉinaj skatoloj kun Juda spirito ene (Schor 2009).

Se Esperanto estas malgranda lingvo, ĉu eblas ĝin uzi por esprimi ĉion? Kvan-
kam ĉi tiu demando ne plaĉas al multaj esperantistoj, mi pensas, ke ĝi estas
grava kaj meritas respondon. Unue, oni devas distingi du malsamajn nivelojn:
la kogna, propra de ĝenerala lingvistiko, kaj la socilingvistika nivelo. Principe,
el kogna vidpunkto, ĉiuj homaj lingvoj povas esprimi ĉion: se vorto mankas
en iu lingvo, oni povas konstrui ĝin laŭbezone. Tio veras kaj por la grandaj
kaj por la malgrandaj lingvoj. Ekzemple, kiam oni komencis paroli pri infor-
madiko en la franca lingvo, oni laŭlitere inventis vortojn por komputilo (*ordi-
nateur*) kaj softvaro (*logiciel*). Tio estas tute normala afero, eĉ por grandaj kaj
fortaj lingvoj kiel la franca: en la pasinteco multaj francaj vortoj eniris la an-
gla vortaron, nuntempe ofte estas la angla kiu kreas novajn konceptojn, kaj
la franca devas adaptiĝi, vole-nevole – kiel okazas kun preskaŭ ĉiuj aliaj lin-
gvoj.

El socilingvistika vidpunkto la situacio malsimilas inter la diversaj lingvoj.
Lingvo kies teritorio ne havas marbordon, evidente ne produktos primaran
vortaron unuavide. Kaj se oni devas verki sciencajn tekstojn la listo de la lin-
gvoj en la mondo kiuj povas esti uzataj mallongas: post la falo de la latina,
malmultaj lingvoj disvolvis tian vortaron (Gordin 2015). Kaj, pli kaj pli, la
angla gajnas terenon sur ĉiuj aliaj, en ĉiuj sciencaj kampoj – kaj ne nur.

Esperanto ne estas escepto. En kelkaj kampoj, la tradukoj simple ne ekzis-
tas. Mi donu spritan ekzemplon. La Disnejaj anasaj fratoj nevoj de Donald
ne havas Esperantan tradukon, ĉar ne ekzistas publikaĵoj de la Disneajaj ko-
miksoj en la lingvo. En la angla oni diras Huey, Dewey and Louie, kiuj iĝas
Kwik, Kwek kaj Kwak en la nederlanda, kaj Qui, Quo, Qua en la itala. Eble
oni povas prunti la kroatan version: Hinko, Vinko kaj Dinko. Aŭ eble, pli
kreive, oni povus diri Kviko, Kveko kaj Kvako adaptante la nederlandan, baze
je la fakto, ke *kvaki* estas esperanta verbo por la blekado de ranoj kaj anasoj.

Ĉio dependas de la agado de la Esperanto-parolantaro. Aliaj famaj komik-
soj estas tradukitaj, aparte la flandraj: ekzistas ekzemple Tinĉjo, kaj Cisco kaj
Vinjo (Figuro 4). Sed, oni ne devas pensi, ke la vigleco de lingvo dependas nur
de la elasteco en tradukado: gravan rolon ludas la produktado de originalaj
kulturaĵoj. Kaj tio portas nin rekte al alia ofta demando.

If Esperanto is a minor language, can it be used to express everything? Even if this question makes many Esperantists uncomfortable, I think that it is important and deserves an answer. First, we should distinguish two different levels: the cognitive level, which comes under the heading of General Linguistics, and the sociolinguistic level. In principle, from a cognitive point of view, every human language can express everything: if a word is lacking in a given language, it is possible to create it, according to necessity. This is true both for major and for less important languages. For example, when the French started talking about Computer Science, they literally invented words for computer (*ordinateur*) and software (*logiciel*). This is normal, even for major and powerful languages like French: in the past many French words were added to the English dictionary, now it is English which most often creates new concepts, and French has to adapt in one way or another – as happens in almost all other languages.

From a sociolinguistic point of view the situation varies for different languages. A language whose territory has no coast, evidently has little interest in producing a dictionary of vocabulary relating to the sea. And for writing scientific texts, the list of the world's languages which can be used is really short: after the fall of Latin, few languages developed such a dictionary (Gordin 2015). And, more and more, English is winning territory from all other languages, in every scientific field – and not only in science.

Esperanto is no exception. In some fields, translations simply do not exist. I will give you an amusing example. The Disney duck brothers who are nephews of Donald do not have any translation in Esperanto, as Disney comics are not published in the language. In English we say Huey, Dewey and Louie, who become Kwik, Kwek and Kwak in Dutch, and Qui, Quo, Qua in Italian. Perhaps it might be possible to borrow the Croatian version: Hinko, Vinko and Dinko. An even more creative option would be to adapt the Dutch way, saying Kviko, Kveko and Kvako, based on the fact, that *kvaki* is the Esperanto verb for the sound of frogs and ducks.

It all depends on the activities of the Esperanto speech community. Other famous comics have been translated, in particular Flemish ones: for example Tin Tin, and Spike and Suzy do exist (Figure 4). But, we should not think, that the vigour of a language only depends on translation: an important role is played by the production of an original culture, step by step. And this brings us to the next frequently asked question.

Ĉu Esperanto havas propran kulturon? Kaj aparte literaturon? Se vi sekvis min ĝis nun, la respondo estas banala: jes, kaj jes. Sed denove estas interese iom pliprofundigi. Kio estas kulturo? Kulturo estas verbo, asertis la angla edukada lingvisto Brian Street (1993: 25): ne gravas kio kulturo *estas*, sed male kion kulturo *faras*. Simile, lingvo estas proceso de kolektiva senco-farado kies produktoj estas ĝuste partoj de la kulturo mem. Estas aliaj nelingvaj kulturaj produktoj, kiel muziko kaj pentrado, sed neniu povas dubi, ke lingvo estas grava parto de ĉiu ajn kulturo.

Ĉar Esperanto ja havas vivan komunumon, evidente la parolantoj produktas kulturajn kiam ili interagas eĉ se ili ne konscias pri tio. Vortoj kiel ‘libroservo’, ‘gufujo’ kaj ‘landa peranto’ havas specialan signifon kiu estas multe pli granda ol la simpla signifo de la vortopartoj. Ekzemple, ‘gufujo’ estas metaforo: la gufoj estas la noktemaj partoprenantoj de junaj festivaloj kiuj ariĝas en speciala loko, ĉefe lumigita per kandeloj, kie oni trinkas senalkoholajn, ĉefe teon. La etoso estas trankvila kaj senbrua. Kelkfoje eblas aŭdi senelektrajn koncertetojn aŭ laŭtlekadon de poemoj. En la 1990aj jaroj estiĝis unuafoje tiu ĉi loko, ĉar ĝenerale mankis trankvila ĉambro kie oni povas paroli kaj interkonatiĝi. Loko sen la bruo de laŭta muziko por dancigi homojn, aŭ la kutima klaĉo de la drinkejo. La gufujo do estis tuta invento kiu sukcesis ĉar la komunumo de junaj esperantistoj bezonis ĝin: nun, oni ne povas organizi festivalon sen havi gufujon, alikaze la plendoj de la partoprenantoj certe venos. La 24-an de Junio 2013, Alexandre Coutu, memdifinita “tradukisto kaj poligloto”, respondis al demando aperinta en Quora, populara retejo por demandoj kaj respondoj (Figure 5):

Question: What makes a good gufujestro? ‘Gufujestro’ is the person in charge of the ‘gufujo’, the quiet, candle-lit room where people can drink tea at Esperanto events. *Answer:* Frankly, I think a good gufujestro needs to be quiet, relaxed, respectful, discreet... If you came out of the gufujo and you had a great experience, you shouldn’t even remember who the gufujestro was, at least not for anything else than just the person who quietly took your order. Beyond that, the person should also seek to protect that atmosphere by ensuring that peace isn’t disturbed (Coutu 2013).

Does Esperanto have its own culture? And in particular its own literature? If you have been following me until now, the answer is easy: yes, and yes. But again it is interesting to go a bit deeper. What is culture? Culture is a verb, argues the English educational linguist Brian Street (1993: 25): it does not matter what culture is, but what culture does. Analogously, language is a process of collective meaning-making whose products in themselves are part of a specific culture. There are other non-language cultural products, such as music or painting, but nobody can doubt, that language is an important part of any culture.

Having seen that Esperanto does have a living community, evidently the speakers create cultural products when they interact, even if they are not aware of doing so. Words like *libroservo* (book service), *gufujo* (a cage for owls) or *landa peranto* (country mediator) have special meanings which are much larger than the simple meaning of their elements. For example, *gufujo* is a metaphor: the *gufoj* (owls) are participants of Esperanto Youth Festivals who enjoy night life; they group together in a special place, mainly lighted with candles, where they drink non-alcoholic drinks, mainly tea. The atmosphere is calm, without noise. Sometimes it is possible to listen to non-electric small concerts or poetry readings. This kind of place emerged in the 1990s, because in general a quiet room was needed where people could meet and talk. A place without loud music for dancing, or the usual chatting of the pub. The *gufujo* therefore was a real invention which had success because the community of the young esperantists needed it; now, it is not possible to organize a festival without having a *gufujo*, otherwise people will be complaining. On the 24th of June 2013, Alexandre Coutu, self-defined as a “translator and polyglot”, answered a question which appeared in Quora, a popular website devoted to question and answers (Figure 5):

Demando: Kia estas bona gufujestro? ‘Gufujestro’ estas homo kiu respondecas pri ‘gufujo’, la trankvika, kandel-lumigita ĉambro kie homoj povas teumi ĉe Esperanto-renkontiĝoj. *Respondo:* Sincere, mi opinias, ke bona grufujestro devas esti trankvila, senstreĉa, respektoplena, diskreta... Kiam vi ĵus eliris el gufujo kaj vi ĝuis la esperon, eble vi eĉ ne memoras kiu la gufujestro estis, almenaŭ ne pro io alia ol la fakto ke li estis la persono kiu kviete prenis vian mendon. Krom tio, la homo devus ankaŭ protektadi la etoson, garantianta, ke la paco ne estos ruinigita (Coutu 2013).

Kompreneble, grava parto de kulturo estas literaturo. Estas ĉirkaŭ 6 000 lingvoj en la mondo, kaj eble nur triono havas skribsistemon reala uzatan. Sed literaturo en la tradicia senco de la vorto signifas havi verkistojn kies verkoj havas iun gravecon por la tuta homaro. Se ni akceptas tiun ĉi difinon, literaturo estas lukso kiun malmultaj lingvoj havas, eble centoj, certe malpli ol mil.

Esperanto naskiĝis en skribita formo kaj do estis preta por krei literaturon ekde la komenco. Kaj fakte tio okazis. Zamenhof volis traduki ĉefverkojn de la monda literaturo, kiel la Biblio kaj Hamleto, kaj post lia ekzemplo aliaj tradukoj venis, kaj ankaŭ originala literaturo. La kialoj por verki en Esperanto varias: por kelkaj, estas la sensacio esti pli libera uzi Esperanton ol aliaj lingvoj ĉar ĝi estas regula: se vi kreas novan kunmeton laŭ la reguloj kaj la signifo klaras, neniu povas aserti ke ĝi malkorektas. Por denaskaj parolantoj de grandaj lingvoj, ofte temas pri etika elekto, ĉar la flago de Esperanto neniam estis makulita de sango pro militoj, male al la aliaj. Por denaskaj parolantoj de malgrandaj lingvoj, temas pri maniero konigi propran kulturon al internacia publiko kiu estas nature atenta al la valoro de ĉiu kulturo, aparte se malforta kaj en danĝero. Gerrit Berveling (1994), recenzante Esperantan romanon de Trevor Steele, diras:

Esperantismo ja ne estas nura okupiĝo, pri [...] Esperanto; ĝi entenas multe pli: i.a. gravegas certa respekto antaŭ alies kulturoj, respekto antaŭ homoj de aliaj rasoj. [...] homoj gravas kaj iliaj kulturoj ĉar ĉiuj en si mem havas sian indecon. [...] Jen kion mi nomas tie esperantisma idealo.

Tiu sinteno formas vere transnacion kulturon kiun esperantistoj sentas mal-fremda: en Esperantujo neniu estas fremdulo, ĉiuj povas kontribui per propra sperto al daŭra senco-farado de tiu ĉi nova speco de kulturo, vere originala.

Permesu nun al mi en la angla lingvo diri kelkajn vortojn pri la nuna stato de esplorado en interlingvistiko.

Of course, literature is a big part of culture. There are approximately 6,000 languages in the world, and perhaps only one third of them have a writing system that is really in use. But literature in the traditional sense of the word means having writers whose works have some importance for all mankind. If we accept this definition, literature is a luxury that few languages have, perhaps hundreds, certainly less than one thousand.

Esperanto was born in a written form and therefore it was ready to create literature from the start. And that is what actually happened. Zamenhof wanted to translate masterpieces of world literature, such as the Bible and Hamlet, and following his example other translations appeared, besides original literature. There are various motivations for choosing to write in Esperanto: for some people, it is the feeling of freedom in using Esperanto rather than other languages because it is regular: if you create a new compound following the rules and its meaning is clear, nobody can claim it is incorrect. For native speakers of major languages, often the use of Esperanto is an ethical choice, because the Esperanto flag was never stained with blood for wars, unlike most others. For native speakers of lesser-used languages, it is a way to make their cultures known to an international public who is keen to give value to any culture, especially if it is weak or in danger. Gerrit Berveling (1994), in writing a review of an original novel in Esperanto by Trevor Steele, says:

Esperantism is certainly not just an engagement with [...] Esperanto; it involves much more: among other things, of great importance are a certain respect for the cultures of others, respect for people of other races. [...] what matters [...] is people and their cultures as all are intrinsically worthwhile. This is what I here call an Esperantist (*esperantisma*) ideal. (in Sutton 2008:6)

This sentiment forms a truly transnational culture that is perceived by Esperantists as non-foreign: in Esperanto land nobody is foreign, everybody can contribute with his or her experience to the continuous sense-making process of a new type of culture, which is really original.

Now let me say a few words in English about the current state of research in interlinguistics.

Interlinguistics in the new Millennium

There are few universities in the world where Interlinguistics is an explicit research field of interest. The literature in the field is scattered, published in many languages – both ethnic and planned – and in many different publishing channels, in many cases outside of the peer-review system. In terms of internal linguistics, as the most highly developed of all planned languages, Esperanto is by far the most studied interlinguistic phenomenon; however, some areas of the language still need further exploration. Marc van Oostendorp, the first linguist to hold this Chair, explored some aspects of the phonology of the language, while my predecessor, Wim Jansen, described different aspects of the syntax under the perspective of Functional Discourse Grammar. The morphology of Esperanto is perhaps the most original part of the language, and it was studied a lot in the past. Lexicology, semantics and pragmatics still need further research. Luckily my colleague Sabine Fiedler in Leipzig explores the pragmatic aspects of Esperanto, in particular phraseology. But certainly we need more academics who know both the language and the culture. In particular, it would be very important to carefully describe the evolution of the language: after more than one century, a diachronic study of Esperanto is still needs to be written. Moreover, the present-day tendencies in the language and in the culture require fieldwork. One of my students in Turin is working on a Master's thesis on the Esperanto speakers' attitudes toward multilingualism: this kind of sociolinguistic research is still in its infancy.

Apart from Esperanto, there is a new Interlinguistic phenomenon that I am exploring: Hollywood languages and their linguistics (Gobbo 2014). Famous TV-series, like *Star Trek* and *Game of Thrones*, have produced some planned languages, respectively Vulcan and Klingon for *Star Trek* and Dothraki and Valyrian for *Game of Thrones*. These fictional planned languages support the suspension of disbelief while watching the series. Furthermore, they are used by fans in the real world. Although the aims of these languages are different from Esperanto, the arts and skills required to produce them are similar. My Interlinguistics students have to plan a language like that as a group assignment, and they quickly discover how difficult this task is. It is necessary to think about every aspect of the language, from phonetics to pragmatics. Finally, the potential of planning languages for educational purposes, particularly in primary schools for fostering metalinguistic awareness, still has to be explored. A small pilot experiment is running in a Montessori school in Milan, under my supervision (Gobbo *et al.* 2015, 2013b).

Interlingvistiko en la nova Jarmilo

Estas malmultaj Universitatoj en la mondo kie Interlingvistiko estas eksplicita esplorintereso. La literaturo estas disa, oni publikigas rezultojn en multaj lingvoj – etnaj kaj planitaj – kaj en multaj diversaj kanaloj, en multaj kazoj for de la samrangula reviziado-sistemo. En la vortoj de interna lingvistiko, Esperanto estas la plej disvolvita planlingvo entute kaj do la plej studata interlingvistika fenomeno; tamen, kelkaj partoj de la lingvo bezonas pluan esploradon. Marc van Oostendorp, la unua lingvisto kiu katedrulis ĉi-tie, esploris kelkajn aspektojn de la fonologio de la lingvo, dum mia antaŭulo, Wim Jansen, priskribis diversajn aspektojn de la sintakso perspektive de Funkcia Diskurs-Gramatiko. La morfologio de Esperanto estas eble la plej originala parto de la lingvo, kaj estis studita multe en la pasinteco. Leksikologio, semantiko kaj pragmatiko bezonas pluan esploradon. Mia kolegino Sabine Fiedler en Lepsiko esploras la pragmatikajn aspektojn de Esperanto, aparte frazeologion. Sed certe oni bezonas pli da universitataj fakuloj kiuj konas kaj la lingvon kaj la kulturon. Aparte gravas detale priskribi la evoluon de la lingvo: post pli ol unu jarcento, historio de Esperanto en diakronio ankoraŭ ne estas skribita. Plue, la aktualaj tendencoj en la lingvo kaj la kulturo bezonas surkampan esploradon. Unu el miaj studentoj en Torino estas verkanta magistran tezon pri la aliroj al multlingvismo de la Esperanto-parolantoj: tiu speco de socilingvistika esplorado estas ankoraŭ en sia infaneco.

Aparte de Esperanto, estas nova Interlingvistika fenomeno kiun mi estas esploranta: Holivudaj lingvoj kaj ilia lingvistiko (Gobbo 2014). Famaj TV-serioj, kiel *Star-Treko* aŭ *Ludoj de la Tronoj*, produktis kelkajn planlingvojn, respektive la Vulkanan kaj la Klingonan por *Star-Treko* kaj la Dotrakan kaj la Valiran por *Ludoj de la Tronoj*. Ĉi tiuj fikciaj planlingvoj subtenas la suspension de nekredemo kiam oni spektas la televid-serion. Krome, ili estas uzataj de entuziasmuloj en la reala mondo. Eĉ se la celoj de ĉi tiuj lingvoj estas malsamaj kompare kun Esperanto, la artoj kaj slojdoj por produkti ilin similas. Miaj studentoj en Interlingvistiko devas plani lingvon similan kiel grupan taskon, kaj rapide ili malkovras kiom malfacila la tasko ja estas. Oni devas pripensi ĉiun aspekton de la lingvo, ekde fonetiko ĝis pragmatiko. Fine, la potencialo de planlingvumado por edukaj celoj, speciale en bazlernejoj por plialtigi metalingvistikan konscion, estas ankoraŭ farendaj. Malgranda pilota terenekspperimento estas nuntempe farata en Montesori-lernejo en Milano, sub mia supergardo (Gobbo *et al.* 2015, 2013b).

Before the acknowledgements, a final word about my attitude towards the English language. I am not an enemy of the English language: without English, I would not be standing here before you. At the same time, I think that English alone is not enough for higher education and universities, particularly in Europe. Nor is Esperanto enough on its own, or any other language. We need to rethink every level of education as a truly multilingual environment. In short: yes to English, yes to Esperanto, yes to national languages, yes to minority languages.

Dankwoord

Een hoogleraar aan de Universiteit van Amsterdam is niet alleen in het werk, maar wordt ondersteund door het hele universiteitssysteem. Ik wil de Rector Magnificus bedanken voor de uitnodiging in het Maagdenhuis, waar ik mezelf gepresenteerd heb aan mijn nieuwe collega's. Ik dank ook de Decaan voor zijn warme verwelkoming in zijn kamer. Het Curatorium van de leerstoel – Kees Hengeveld, Arjen Versloot en Nicoline van der Sijs – hielp me in veel opzichten in het eerste jaar hier. Ook mijn voorganger, Wim Jansen, die veel praktische bijzonderheden heeft uitgelegd. De collega's in het Amsterdam Center for Language and Communication (ACLC) laten me voelen in één keer een deel van een groep uit te maken; in het bijzonder de leden van de groep Talking about Learners (TaL), met meertalige woordspelen. En onze Research School Coordinator ACLC, Marten Hidma, en medewerkers. Met mijn collega's in het Europees project MIME – László Marác, Virginie Mahadou en hun medewerkers – creëren we een levendige en interessante onderzoeksomgeving. Ik wil collega's bedanken van het Institute for Logic, Language and Computation (ILLC) die mij hebben uitgenodigd mijn onderzoek in constructieve adpositionele grammatica's te presenteren, met name Johan van Benthem en Maria Aloni. Ik vergeet nooit onze fantastische bibliothecarissen Stefano Giani en vooral Ewa Zakrzewska, samen met wie we een tentoonstelling van Esperantoboeken georganiseerd hebben. Nynke Bos en haar medewerkers, op de ICT-afdeling. Onze secretaresses, in het bijzonder Wendy Brom. De portiers van het Bungehuis. Alle collega's die ik ben vergeten. Een speciaal woord van dank aan Rob Moerbeek en Anna Löwenstein, die het manuscript hebben nagelezen, in zoveel talen geschreven! En ten laatste, mijn collega Beppie van de Bogaerde, die mij inspireerde met haar oratie in de Nederlandse Gebarentaal, teken ik: <DANK U> (*in de NGT*). Ik hoop dat deze taal binnenkort officieel erkend wordt.

Ik heb gezegd.

Antaŭ la dankvortoj, mi volas klarigi mian rilaton kun la angla lingvo. Mi ne estas malamiko de la angla lingvo: sen la angla, mi ne povus veni ĉi tie en ĉi tiu pozicio antaŭ vi. Samtempe, mi pensas, ke nur la angla ne sufiĉas por altlernejoj kaj Universitatoj, aparte en Eŭropo. Nek sufiĉas Esperanto nur, aŭ ĉiu alia lingvo. Ni bezonas pripensi denove ĉiun nivelon de edukado kiel vera multlingva medio. Resume: jes al la angla, jes al Esperanto, jes al naciaj lingvoj, jes al minoritataj lingvoj.

Acknowledgements

A professor at the University of Amsterdam does not stand alone in his work, but is supported by the entire university system. I want to thank our Rector Magnificus for inviting me to Maagdenhuis, where I could present myself to my new colleagues. I also thank the Dean for the warm welcome. The Curatorium of the Chair – Kees Hengeveld, Arjen Versloot and Nicoline van der Sijts – helped me in many ways during my first year here. Also my predecessor Wim Jansen, who helped me with a lot of practical details. My colleagues at the Amsterdam Center for Language and Communication (ACLC) made me feel like a part of the group at once; in particular the members of the group Talking about Learners (TaL), a multilingual pun. And our Research School Coordinator ACLC, Marten Hidma. With my colleagues at the European project MIME – László Marác, Virginie Mahmadou and their collaborators – we create a lively and interesting research environment. I want to thank my colleagues at the Institute for Logic, Language and Computation (ILLC) who invited me to present my research in constructive adpositional grammars, in particular Johan van Benthem and Maria Aloni. I will never forget our fantastic librarians Stefano Giani and especially Ewa Zakrzewska, with whom we organised an exhibition of Esperanto books. Nynke Bos and her collaborators, in the ICT department. Our secretaries, in particular Wendy Brom. The Bungehuis porters. Any colleague I have forgotten to mention. Special thanks to Rob Moerbeek and Anna Löwenstein, who proofread the manuscript, written in so many languages! And last but not least, for my colleague Beppie van de Bogaerde, who inspired me with her inaugural lecture in the Dutch Sign Language, I sign: THANK YOU (*in Dutch Sign Language*). I hope that your language will soon be officially recognized in the Netherlands.

Ik heb gezegd.

References

- Adam C. & Tannery P. *Descartes, René (1596-1650). Correspondance. 1, Avril 1622-février 1638*, Gallica Biliothèque Numérique, 1987.
- Beverling, G. *Esperantisma romano pri temo nemovada. Fonto*, 161. 1994.
- Blanchet, P. *La linguistique de terrain. Méthode et théorie: Une approche ethno-socio-linguistique*. Rennes: Presses universitaires, 2000.
- Coutu, A. *Esperanto (language): What makes a good gufujestro?* <<http://quora.com>>. Posted on 24 Jun 2013.
- Eco, U. *The search for the perfect language*, London: Blackwell, 1995.
- Eco, U. *La ricerca della lingua perfetta nella cultura europea*, Bari: Laterza, 1993.
- Edwards, J. *Minority Languages and Group Identity*. Amsterdam: John Benjamins. 2010.
- Edwards, J. *Esperanto and an international research context*. In H. Tonkin and K. Johnson-Weiner (eds.), *The idea of a universal language. Report of the Fourth Annual Conference of the Center for Research and Documentation on World Language Problems*. New York: The Center. 97-107.
- Gobbo, F. & Adami, I. & Bonazzoli, C & Pradella, P. *Orientation towards Multilingualism in Class: a Montessori Esperience. Journal of the Association Montessori Internazionale*. Forthcomming. 2015.
- Gobbo, F. *Interlinguistics and Esperanto studies at universities: The experience at the University of Turin. Language Problems and Language Planning* 38:3. 292-303. 2014
- Gobbo, F. *Esperanto and minority languages: Challenges and opportunities. John Buchanan study day*. University of Liverpool, October 17, 2013.
- Gobbo, F. *Learning Linguistics by Doing: The Secret Virtues of a Language Constructed in the Classroom. Journal of Universal Language* 14:2. 113-135. 2013.
- Gordin, M. D. *Scientific Babel: How Science Was Done Before and After Global English*. Chicago: University of Chicago Press. 2015.
- Halperin, L. R. *Modern Hebrew, Esperanto, and the Quest for a Universal Language. Jewish Social Studies: History, Culture, Society*. 19(1). 2012. 1-33.
- Holzahaus, A. ed. *Opyt grammatiki novoevrejskogo jazyka (žargona). Provo de grammatiko de novjuda lingvo*. Helsinki: Fondumo Esperanto. 1982.
- Kimura, G. C. *Esperanto and minority languages: A sociolinguistic comparison. Language Problems & Language Planning* 36(2): 167-181. 2012.
- Maimon, N. Z. *La cionista periodo en la vivo de Zamenhof. La Nica Literatura Revuo*. 3. 126-137.
- Privat, E. *Vivo de Zamenhof*. London: 1920.
- Romain, S. *Revitalized Languages as Invented Languages*. In Adams, M. (ed). *From Elvish to Klingon*. Oxford: Oxford University Press. 2011

- Rossi, P. *Logic and The Art of Memory: the Quest for a Universal Language*, Continuum, 2000.
- Sadan, T. La “reviviĝo” de la hebrea sen mitoj. In Wandel A. (red.) *64a Internacia Kongreso Universitato*. Kopenhago, Danio. 23-30 julio 2011. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio. 32-41. 2011
- Schor, E. Esperanto: A Jewish story. *Pakn Treger*. 60. Yiddish Book Center. 2009
- Street, B. V. Culture is a Verb: Anthropological aspects of language and cultural process. In Graddol, D. and Thompson, L. and Byram, M. (eds). *Language and Culture*. Clevedon: British Association of Applied Linguistics. 1993.
- Sutton G. *Concise Encyclopedia of the Original Literature of Esperanto 1887-2007*. New York: Mondial. 2008

Figures

Figure 2 Source: Esperantoland.org (March 2015)




Figure 3



Figure 4



Figure 5

The image is a screenshot of a Quora page. At the top, the browser address bar shows the URL 'https://www.quora.com/Esperanto-language/What-makes-a-good-gufujestro'. The Quora logo and search bar are visible. The main heading is 'Esperanto (language): What makes a good gufujestro?'. Below the heading, a definition states: 'Gufujestro' is the person in charge of the 'gufujo', the quiet, candle-lit room where people can drink tea at Esperanto events. The page shows '10 WANT ANSWERS' and '2 ANSWERS'. One answer is visible, by Alexandre Coufu, translator and polyglot, with 11 upvotes. The answer text reads: 'The gufujo is a place that brings you outside of wherever you were before you got in. It's a place of introspection, where you can feel mellow or let your feelings surface, where you should be able to just be yourself and not be confronted with the harshness of reality... for just a little while. Frankly, I think a good gufujo needs to be quiet, relaxed, respectful, discreet... If you came out of the gufujo and you had a great experience, you shouldn't even remember who the gufujo was, at least not for anything else than just the person who quietly took your order. Beyond that, the person should also seek to protect that atmosphere by ensuring that peace isn't disturbed.' The page also includes a 'QUESTION TOPICS' section with 'Esperanto Culture', 'Esperanto (language)', and 'Tea'. There are 'SHARE QUESTION' options for Twitter and Facebook, and 'QUESTION STATS' showing 1,442 views and 10 want answers.